

Hector Hodler : lia infaneco
Claude Gacond, 344-a radioprelego, 1970.05.13 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum mia malsano mia edzino legis al vi tekstojn de Hector Hodler. Ni hodiaŭ turnu nian atenton al la eksterordinara vivo de tiu sviso, kiu mortis antaŭ 50 jaroj je la 31-a de marto 1920 en la aĝo de 33 jaroj.

A.- Hector Hodler naskiĝis la 1-an de oktobro 1887 en Genève, do je la sama jaro kiel la Lingvo Internacia de D-ro Esperanto.

Cl.- Lia patro estis famiĝinta pentristo. Hodiaŭ la pentraĵoj de Ferdinand Hodler estas ege valoraj. Hector ne havis facilan vivon. Dum longaj horoj ĉiutage ekde la plej eta infaneco li devis ludi la rolon de pozisto. Dum la patro lin desegnis, kaj ree desegnis kaj redesegnis, li legis kaj ĉefe pensadis.

A.- Sed tiuj senmovaj staradoj, kaŭradoj, genuadoj aŭ sidadoj ne favoris la korpan disvolviĝon. Pro tio la malsano estos pli kaj pli la ĉiutaga kunulo de tiu junulo.

Cl.- Kiel la patro Ferdinand Hodler, Hector Hodler estas memfarita homo. Li ne finos la gimnazion, kaj tamen li estas unu el niaj plej grandaj verkistoj kaj pensuloj.

A.- Kiam esperanto estos instruata en la gimnazioj, tiam multaj studhoroj devos atente ekzameni la filozofion de Hector Hodler. Sed bedaŭrinde la nunaj esperantistoj ĝenerale nekonas tiun penson. Manko de pens-kriterioj, kiun Hector Hodler plurfoje denunciis, faras, ke ni preferas bagatelaĵojn al niaj veraj literaturaj trezoroj. Ho, venu la tempo, kiam ni povos malfermi veran someran universitaton, kie nia literaturo estos sisteme instruata al almenaŭ esperantista elito !

Cl.- En la gimnazio Hector Hodler estis kamarado de Edmond Privat, kiu estis du jarojn pli juna. El tio la granda influo de la hodlera penso kaj spirito sur la knabon kaj poste plenkreskulon Privat.

A.- Edmond Privat ŝatis paroli pri tiuj gimnaziaj jaroj, kaj pri tiu neforgesebla amikeco. Ni donu al li la parolon citante el antaŭparolo al libro titolita *Hector Hodler* :

Cl.- « *Kiam mi dekdujare eniris gimnazion, mi tuj rimarkis tiun novan kamaradon, altan, malgrasan, malriĉan, kun mirindaj okuloj, kaj senordaj brunaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton. Lia neforgesebla figuro aperis sur pli ol unu pentraĵo de l' patro.*

A.- *Kiam ni kune elkuris el klaso je la kvara posttagmeze, Hector Hodler malgaje rapidis al la patra pentrejo sub tegmento por sidadi aŭ staradi terure senmove dum horoj kiel modelo. Dum tiu turmento li kutimiĝis je pensado. Tiam li lernis tiun silentemon kaj trankvilecon, kiuj kaŝis sub iom nevarma eksteraĵo la plej senteman koron kaj fervoran animon.*

Cl.- *Kiam la patro ne bezonis lin, ni faris kune longajn promenadojn, diskutante kiel knabetoj pri la profundaj misteroj de l' socia vivo. Li estis la pli saĝa kaj la pli multscia. Dekdujare li jam legis tutan Zola ! »*

A.- Edmond Privat iom modestas, kiam li diras « *diskutante kiel knabetoj* ». Ni prefere diru kiel junaj kaj jam sufiĉe maturaj filozofoj. Eĉ la ĝeneva filozofo Ernest Naville interesiĝis pri la penso de tiuj junuloj. Li invitis ilin plurfoje. En la manuskriptoj de la Dokumentaro Edmond Privat en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds ni havas interesan tekston tiurilate.

Cl.- Fakte se Hector Hodler estis filo de la pentristo, li ne estis rekta infano. Lia patrino estis pozistino de la pentristo. Ŝi nomiĝis Augustine Dupin.

Hector Hodler : lia infaneco
Claude Gacond, 344-a radioprelego, 1970.05.13 & 16

A.- Inter ŝi kaj la pentristo la vivo ne estis facila. Sed pri tiu malfacila familia vivo Hector Hodler silentadis. Edouard Stettler, kiu multjare laboris kun Hector Hodler en la UEA-oficejo tiel priskribas lin :

Cl.- « *La silenta Hodler, kaj tio estas forta trajto de la karaktero, neniam parolis pri siaj intimaj aferoj, nek esploris tiujn de la aliaj. Eĉ kiam mortis lia patrino en 1910, li diris preskaŭ nenion, sed ni ĉiuj en la oficejo, vidante tiun viran junulon, kiel li trapaŝis la ĉambron, la larmojn en la okuloj, kiel li laboregis por forgesi la akran doloron, ni sentis la tutan forton de l' amo lin liganta al la kara patrino. En ŝi li perdis la malmultan lumon de sia juneco.* »

A.- Kaj jen kiel Hector Hodler kaj Edmond Privat ekfamiĝis en Esperantio. Ni citas Edmond Privat :

Cl.- « *Unu tagon en 1903 mi alportis en klason esperantan gramatikon. « Ankaŭ mi jam eklernis la lingvon », li respondis kun brilo en la okuloj. Post tri semajnoj ni jam flue interparolis en la nova lingvo kaj decidis fondi klubon kaj ĵurnaleton : **Juna Esperantisto.***

A.- Unu post unu vendiĝis niaj belaj premilibroj aŭ volumoj de Jules Verne por pagi la eldonelspezojn. La redakcio sidis dum kvin jaroj sur la sama benko en la fundo de klasejo. Dum kiom da lecionoj pri matematiko ni gluis poŝtmarkojn, skribis adresojn aŭ legadis patrajn leterojn de profesoro Cart aŭ D-ro Zamenhof ! »

Cl.- Kelkaj dokumentoj el tiu epoko nun troviĝas en la biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

A.- Antaŭ ol sin pli profunde dediĉi al esperanto tiuj junuloj volis informiĝi pri la aliaj projektoj de internacia lingvo. Ili kune lernis kaj provis praktiki Idiom Neutral kaj la Bluan Lingvon de Bollack, blua pro la koloro de la ĉielo, kiu kovras la tutan homaron. Estas du komplete diversaj sistemoj, la unua estas naturalisma. Jen **Nia patro** en Idiom Neutral :

Cl.- « *Nostr patr kel es in sieli, ke votr nom es sanktifiked ; ke votr regnia veni ; ke votr volu es fasied kuale in siel, tale et su ter.* »

A.- La dua estis arbitra. Jen teksto en la Blua Lingvo, kiu signifas : « *Kia grandega avantaĝo por la homa specio, se de popolo al popolo ni povus komuniki per sama lingvo.* »

Cl.- « *Ak vop sfermed pro spes maned, if om pobl te pobl, ne ei minoka pfo an am lank.* »

A.- Post tiuj ekprovoj praktiki aliajn projektojn, ili konvinkiĝis, ke nur esperanto estas parolebla. Kaj ili eklaboris por enkrusti esperanton en la socian vivon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-